



# ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

## Josef Hendrich: Umělý jazyk podle Jana Amosa Komenského

Už předchůdce Komenského Ludvík Vives, narozený sto let před ním, projevil touhu po universálním jazyku, který by spojoval všechny národy světa; ale dokud ho není, musíme se spokojit jazykem nejrozšířenějším, latinou.

Podobně zatoužil Komenský po dokonalejším pojetí všeho lidstva, po mezinárodním umělém jazyku. Když prodléval v Anglii, viděl názorně, jak mořeplavba spojuje už i nejbzdálenější kouty světa; a že by se už celý svět mohl státi takřka jedním domem, kdyby všechny národy měly jeden jazyk. Pojal tedy do knihy, psané v Anglii, do *Cesty světla*, také kapitulu o způsobu všeobecného jazyka. Tam si ocitoval slova Vivesova a projevil touhu po jazyku zcela novém, který by byl snadnější, lahodnější a dokonalejší než všechny řeči dosud známé. Ale zůstal jen při pokynech zcela všeobecných.

Znovu se k této myšlence vrátil, když psal svou *Všeobecnou poradou o nápravě věci lidských*. Jednou z knih této *Všeobecné porady* je *Panglottia, Všemluva*. Je to kniha, která byla považována za ztracenou (stejně jako pět jiných částí); ale před válkou objevil pohřešované rukopisy prof. Čyževskij.\* Nejsou dosud vydány a nebudou tak hned všechny přístupny širšímu kruhu čtenářů. Proto chceme malou ukázkou podati představu, jak chtěl Komenský řešit problém světového jazyka.

Ve *Všemluvě* podává totiž Komenský už konkrétní ukázky. Není tu ovšem zpracován systém celého jazyka; zcela naopak, Komenský doporučoval nezačínati dříve, dokud nebude zpracována vševěda. Nicméně znázornil na ukázkách, jak si představuje sestavování nové mluvy. Tyto ukázky jsou dvojího druhu. Nejčastěji bere Komenský za základ slova latinská a ukazuje na nich, jak by se umělý jazyk zjednodušil proti složitosti a nerovnoměrnosti současných jazyků; za druhé volí na ukázkou slova nová, podle nových zásad tvořená, a ukazuje na nich už co nejkonkrétněji, jak by se mohla tvořit nová mezinárodní řeč.

\* Srovnej Dimitrij Čyževskij, *Hallské rukopisy děl J. A. Komenského*. Archiv pro bádání o životě a spisech J. A. Komenského, sešit 15, 1940.

Zajímavá je v *Panglottii* přehlídka dosavadních jazyků, proč se nehodí za jazyk všeobecný. Položíme zde na ukázkou jen dva odstavky (kap. VI, § 10 a 11):

„Ani žádný z živých jazyků, třeba nejvypěstovanějších, se nehodí; neboť žádnému z nich by nechyběli přímluvčí a každý národ by se honosil svou Helenou; proto bychom se nedostali kupředu bez závistí, sporů a nových zmatků. A doopravdy nemáme žádný dostatečně způsobilý. Italština, španělština, frančtina jsou potůčky z jazyka latinského, rozmnožené novými nikoli prameny, nýbrž mezerami. Frančtinu doporučuje obratnost a příjemnost; ale nelze ji ustanovit za zprostředkovatele moudrosti, poněvadž nestojí na vlastních kořenech, vychází z cizích. Angličtina se považuje za ještě snazší, ale hodí se nám ještě méně — poněvadž je to ještě větší snůška.

Co o slovanštině? Ta se zdá již vhodnější, poněvadž: 1. jako themata má zvuky celkem přirozené, 2. ve skládání a odvozování slov je šťastná, 3. má zvuky či písmena všeho druhu. Ale ani ona se nehodí k zamýšlenému universálnímu cíli, poněvadž: 1. je příliš syková svými zvuky a shluky souhlásek, 2. dělí se na mnoho dialektů, které sotva sobě samým rozumějí — který z nich by vyhrál? 3. Kterýkoli tento dialekt se hemží nekonečnými nepravidelnostmi.“

Jak vidno, bral Komenský slovanštinu za jediný jazyk; mluví-li jinde o jednotlivých jazycích slovanských, považuje češtinu a polštinu za jazyk týž.

Jako ukázkou té skupiny, kde Komenský znázorňuje své návrhy na materiálu latinského jazyka, vezmeme si sloveso, a to sloveso býti. Slovesa mají různé tvary podle osob a podle časů. To je zbytečné. Nač se učit různým koncovkám? Pro označení osoby postačí nám prostě zájmena. Vezmeme kořen slova *esse* — *es*; pak budeme časovat jednoduše tím, že budeme před kmen předřázet osobní zájmeno. Bude tedy indikativ presentis tento:

jsem (sum)	<b>e</b> ges	jme (sumus)	<b>mo</b> ses
jsí (es)	<b>t</b> ues	jste (estis)	<b>vo</b> ses
jest (est)	<b>i</b> lles	jsou (sunt)	<b>i</b> llies

Podobně jsou zbytečné koncovky pro čas mi-

nulý; stačí předrazit znak minulosti *ante* = před. Bude tedy

byl jsem	<b>anteges</b>	byli jsme	<b>antnoses</b>
byl jsi	<b>anttues</b>	byli jste	<b>antvoses</b>
byl	<b>antilles</b>	byli	<b>antillies</b>

Zcela podobně se vyřídí futurum znakem budoucnosti *post* = potom:

budu	<b>posteges</b>	budeme	<b>postnoses</b>
budeš	<b>posttues</b>	budete	<b>postvoses</b>
bude	<b>postilles</b>	budou	<b>postillies</b>

Kořen slova bude zároveň infinitivem času přítomného; infinitiv minulý a budoucí opatří se už uvedenými předponami *ante* a *post*.

Docela analogicky je možno zjednodušit skloňování; k čemu jsou nejpestřejší koncovky pádové? Stačí znát sklonění zájmena *quis*. Jeho pády budeme připojovat ke kmenům slov; tak bude skloňování jen jediné, zájmenné.

U přídavných jmen máme také zbytečné námahy se skloňováním a rozlišováním podle rodu; uveďme to slovy Komenského (VIII, 6): „U přídavných jmen je ve většině jazyků obtížné rozlišování podle tří rodů, nejsnadnější u Němců, vesměs skrze koncovky *—er*, *—e*, *—es*, na příklad *ein guter Mann*, *eine gute Frau*, *ein gutes Kind*. Ale i tyto koncovky se vynechávají, když předchází určitý člen *der*, *die*, *das*, na příklad *der gute Mann*, *die gute Frau*, *das gute Kind*. Ale Maďaři mají ještě podivuhodnější výhodu. Poněvadž podstatná jména nemají rod, nemají ho ani jména přídavná, a jednou a touž koncovkou se stavějí nejenom ke každému jménu (jako v latině *felix vir*, *femina*, *animal*), nýbrž i ke každému pádu. Jako kdybys latinsky říkal *bon vir*, *bon femina*, *bon animal*, *bon viri*, *bon viro*, *bon virum*, *bon viros* atd. Poněvadž je to velmi výhodné a odstraňuje to mnoho mrzutostí, zasluhuje to napodobení.“

Příklady druhé skupiny, kde se příklady nevolí z latinského materiálu, nýbrž volí se podle nových principů, vezmu ze samostatného dodatku *Panglottie*; má název *Pokusonový harmonický jazyk*.

Zde se už zájmena neberou z latiny; stačí pro ně tři hlásky; tedy *já = o*, *ty = e*, *on = i*. Pro plurál netřeba nových zájmen; proč u nich nepostupovat stejně jako u jiných slov? Připojme prostě koncovku plurálu *—n*. Potom bude *my = on*, *vy = en*, *oni = in*. Skloňování bude velmi jednoduché. Pádů budiž pět, nominativ, genitiv, dativ, akusativ, instrumentál; vokativu není potřebí, volejme nominativem docela pohodlně, jako mnohé jiné jazyky. (Ve *Všemluvě*

byl Komenský radikálnější, tam chtěl vystačit třemi pády.) Koncovkami pádování budou samohlásky *i*, *e*, *a*, *o*.

Bude tedy sklonění toto:

O (já)	<b>o</b>	<b>oi</b>	<b>oe</b>	<b>oa</b>	<b>oo</b>
On (my)	<b>on</b>	<b>oni</b>	<b>one</b>	<b>ona</b>	<b>ono</b>
E (ty)	<b>e</b>	<b>ei</b>	<b>ee</b>	<b>ea</b>	<b>eo</b>
En (vy)	<b>en</b>	<b>eni</b>	<b>ene</b>	<b>ena</b>	<b>eno</b>
I (on, ona, ono)	<b>i</b>	<b>ii</b>	<b>ie</b>	<b>ia</b>	<b>io</b>
In (oni atd.)	<b>in</b>	<b>ini</b>	<b>ine</b>	<b>ina</b>	<b>ino</b>

Podle ohýbání těchto zájmen se budou analogicky skloňovat všechna jména jednotejně. Na příklad, kdyby *El* znamenalo *Bůh*, bude sklonění toto (v singuláru a plurálu):

<b>el</b>	<b>eli</b>	<b>ele</b>	<b>ela</b>	<b>elo</b>
<b>elon</b>	<b>eloni</b>	<b>elone</b>	<b>elona</b>	<b>elono</b>

Kdyby se utvořilo slovo *ela*, bohyně, skloňovalo by se takto:

<b>ela</b>	<b>elai</b>	<b>elae</b>	<b>elaa</b>	<b>elao</b>
<b>elan</b>	<b>elani</b>	<b>elane</b>	<b>elana</b>	<b>elano</b>

Pamatujme, jak výše bylo naznačeno časování slovesa „jsem“ (*eges* atd.). Komenský provádí v *Pokusonový harmonický jazyk* toto časování bez pomoci latiny. Dejme tomu, že *ban* znamená být, že předponu *F* volíme pro futurum, předponu *P* pro praeteritum; *a* = *já*, *e* = *ty*, *i* = *on*; plurál se vyjádří zdĺoužením; *á* = *my* atd.; pak se bude časovat:

Praesens:

<b>bana</b>	<b>bane</b>	<b>bani</b> ;	<b>baná</b>	<b>bané</b>	<b>baní</b>
-------------	-------------	---------------	-------------	-------------	-------------

Praeteritum:

<b>pabana</b>	<b>pabane</b>	<b>pabani</b> ;	<b>pabaná</b>	<b>pabané</b>	<b>pabaní</b>
---------------	---------------	-----------------	---------------	---------------	---------------

Futurum:

<b>fabana</b>	<b>fabane</b>	<b>fabani</b> ;	<b>fabaná</b>	<b>fabané</b>	<b>fabaní</b>
---------------	---------------	-----------------	---------------	---------------	---------------

Souhrnem píše Komenský ke konci: Nový jazyk musí být tak rozumový, harmonický a naskrze vševědný, že by jej nějaký vševěd dovedl obnovit, kdyby byl ztracen.

Ovšem, nemáme vševědu, a tak nedovedeme obnovit tento nedopsaný jazyk. Vždyť i sám Komenský ve své nedokončené práci neprovedl důsledně tytéž principy (ve *Všemluvě* a v *Pokusu*), nýbrž předkládá čtenáři k úvaze své (někdy nahodilě) myšlenky. Čtenář si na příklad povšimnul, že i v našich skrovných ukázkách jsou dva principy pro plurál: jednak přípona *—n*, jednak prodlužování samohlásky.

Dnes už nikomu nevstoupí na mysl budovat umělý jazyk podle náčrtů Komenského. Ale osud, který mu tolikrát ublížil, byl k němu nespavedliv také tím, že jeho *Všemluva* zůstala po staletí ztracena. Jinak by měl Komenský ustálené jméno v dějinách umělých jazyků, kde je neznám!

## Josef Hendrich: Artefarita lingvo laŭ Johano Amos Comenius

Ni publikigas tradukon de nia ĉeĥa ĉefartikolo de Josef Hendrich, profesoro de pedagogio en Karlo-universitato, eminenta fakulo pri Comenius.

Jam Comenius-antaŭulo Ludoviko Vives, naskiĝinta cent jarojn antaŭ li, vidigis de-

ziron por universala lingvo, kiu kunigus ĉiujn naciojn de la mondo; dum ĝi ne ekzistas, ni estas devigitaj kontentiĝi per lingvo plej disvastigita, la latina.

Simile ekdeziris Comenius pri iu pli perfekta

ligilo, pri internacia artefarita lingvo. Kiam li vivis en Anglio, li vidis intue, kiel marnavigado kunigas jam eĉ la plej malproksimajn angulojn de la mondo; kaj ke jam la tuta mondo povus fariĝi preskaŭ unu domo, se ĉiuj nacioj posedus unu lingvon. Prenis do li en libron, verkatan en Anglio, en la *Vojon de la lumo*, ankaŭ ĉapitron pri formo de universala lingvo. Tie li citis vortojn de Vives kaj esprimis deziron pri lingvo tute nova, kiu estus pli facila, pli agrabla, pli perfekta ol ĉiuj lingvoj ĝis nun konataj. Sed li restis nur ĉe difinoj la plej ĝeneralaj.

Denove li revenis al tiu ĉi ideo, kiam li verkadis sian *Universalan interkonsiligon pri plibonigo de homaj aferoj*. Unu el libroj de tiu ĉi *Universala interkonsiligo* estas *Panglotio, Ĉie-lingvo*. Ĝi estas libro, kiu estis rigardata kiel perdita (kiel kvin ceteraj partoj); sed antaŭ la milito trovis la mankantajn manuskriptojn prof. *Čyževskij*.<sup>\*</sup> Ili ankoraŭ ne estas eldonitaj kaj ne estos baldaŭ alireblaj de pli vasta leganta rondo. Tial ni volas per malgranda specimeno doni imagon, kiel volis Comenius solvi problemon de la mondlingvo.

En *Panglotio* ja donas Comenius jam konkretajn specimenojn. Ne estas tie ellaborita sistemo de tuta lingvo; tute male. Comenius rekomendadis ne komenci pli frue ol estos ellaborita pansofio (kompletscienco). Tamen li vidigis per specimenoj, kiel li prezentas al si konstruon de la nova lingvo. Tiuj specimenoj estas de du specoj. Plej ofte prenas Comenius kiel bazon vortojn latinajn kaj montras per ili, kiel artefarita lingvo simpliĝus kompare kun komplikeco kaj nereguleco de samtempaj lingvoj; due li prenas kiel specimenojn vortojn novajn, kreaĵajn laŭ liaj principoj, kaj li montras sur ili tre konkrete, kiel povus esti kreata nova internacia lingvo.

Interesa estas en *Panglotio* trarigardo de la ĝisnunaj lingvoj, kial ili ne taŭgas por lingvo universala. Ni metos tie ĉi specimene sole du alineojn (ĉap. VI, § 10 kaj 11):

„Nek iu el la vivaj lingvoj, eĉ el tiuj plej kulturitaj, taŭgas; ĉar al neniŭ el ili mankus rekomendantoj kaj ĉiu nacio fierus pro sia Helena; tial ni ne progresus sen envio, malpacoj kaj konfuzoj. Kaj efektive ni havas neniun tute taŭgan. La itala, hispana, franca estas riveretoj el la lingvo latina, disvastigitaj ne per novaj fontoj, sed per novaj breĉoj. La francan rekomendas lerteco kaj agrableco; sed oni ne povas ĝin starigi kiel peranton de saĝeco, ĉar ĝi ne staras sur propraj radikoj, eliras el fremdaj. La angla estas rigardata ankoraŭ pli facila, sed ĝi taŭgas por ni ankoraŭ malpli — ĉar ĝi estas ankoraŭ pli granda kompilaĵo.

Kio pri lingvo slava? Tiu jam ŝajnas pli taŭga, ĉar: 1. kiel temojn ĝi havas sonojn ĝenerale naturajn, 2. en kunmetado kaj derivado de vortoj

\* Komparu: Dimitrij Čyževskij, *Hall-manuskriptoj de verkoj de J. A. Comenius en Arhivo por esplorado pri vivo kaj verkoj de J. A. Comenius*, kajero 15, 1940. (Ĉe-lingva teksto en originalo.)

ĝi estas tre bona, 3. ĝi havas sonojn aŭ literojn ĉiuspecajn. Sed nek ĝi taŭgas por intencata celo universala, ĉar: 1. ĝi estas tro sibla pro siaj sonoj kaj amasiĝoj de konsonantoj, 2. dispartiĝas je multaj dialektoj, kiuj apenaŭ unu komprenas la alian — kiu el ili venkus? 3. Ĉiu ajn el tiuj dialektoj svarmas per senfinaj neregulaĵoj.”

Kiel oni vidas, rigardis Comenius la slavan kiel unu lingvo; se li aliloke parolas pri unuopaj slavaj lingvoj, li traktas la ĉehan kaj la polan kiel la saman lingvon.

Kiel specimeno de tiu grupo, kie Comenius demonstras siajn proponojn sur materialo latinlingva, ni prenu la verbon *esti*. La verboj havas diversajn formojn laŭ personoj kaj laŭ tempoj. Ĝi estas senutila. Kial lerni diversajn finaĵojn? Por indiki la personon sufiĉas simple la pronomoj. Ni prenu radikon de la verbo *esse* = *es*; tiam ni konjugacios simple tiel, ke ni antaŭ la radikon metos personan pronomon. Do estos indikativo de prezenco jena:

mi estas (sum)	<b>eges</b>	ni estas (sumus)	<b>moses</b>
ci estas (es)	<b>tues</b>	vi estas (estis)	<b>voses</b>
li estas (est)	<b>illes</b>	ili estas (sunt)	<b>illies</b>

Simile estas senutilaj finaĵoj por tempo estinta; sufiĉas antaŭmeti signon de estinteco ante (antaŭ). Estos do:

mi estis	<b>anteges</b>	ni estis	<b>antnoses</b>
ci estis	<b>anttues</b>	vi estis	<b>antvoses</b>
li estis	<b>antilles</b>	ili estis	<b>antillies</b>

Tute simile oni faros futuron per signo de estonteco *post* (poste):

mi estos	<b>posteges</b>	ni estos	<b>postnoses</b>
ci estos	<b>posttues</b>	vi estos	<b>postvoses</b>
li estos	<b>postilles</b>	ili estos	<b>postillies</b>

Verbradiko estos samtempe infinitivo de prezenco; infinitivo estinteca kaj estonteca devenos el la du jam diritaj prefiksoj *ante* kaj *post*.

Tute analogie oni povas simpligi deklinacion; por kio estas la plej buntaj finaĵoj kazaj? Sufiĉas koni deklinacion de la pronomo *quis*. Ĝiajn kazojn ni aligados al vortradikoj; tiel estos deklinacio unusola, pronoma.

Ĉe adjektivoj ni havas ankaŭ senutilajn klopodojn pri deklinacio kaj diferencigo laŭ la sekso; ni citu pri tio vortojn de Comenius (VIII, 6): „Ĉe la adjektivoj estas en plejmultaj lingvoj diferencigo laŭ la tri seksoj malfacila, plej facila ĉe la germanoj, ĉiam per finaĵoj —er, —e, —es, ekzemple *ein guter Mann, eine gute Frau, ein gutes Kind*. Sed eĉ tiuj ĉi finaĵoj estas forlasataj, kiam antaŭiras difina artikolo *der, die, das*, ekzemple *der gute Mann, die gute Frau, das gute Kind*. Sed la hungaroj havas ankoraŭ pli mirindan avantaĝon. Ĉar la substantivoj ne havas la sekson, nek adjektivoj havas ĝin kaj kun unu kaj la sama finaĵo ili estas metataj ne sole al ĉiu nomo (kiel en la latina *felix vir, femina, animal*) sed ankaŭ al ĉiu kazo. Kvazaŭ vi dirus latine *bon vir, bon femina, bon animal, bon viro, bon virum, bon viro* ktp. Ĉar ĝi estas tre oportuna kaj forigas multajn malagrablecojn, ĝi meritas imiton.”

Ekzemploj el la dua grupo, kie la specimenoj ne estas prenataj el latina materialo, sed estas elektataj laŭ novaj principoj, mi prenos el memstara suplemento de Panglotio; ĝi titolas Provo pri nova harmonia lingvo.

Tie ĉi la pronomoj ne estas prenataj jam el la latina; sufiĉas por ili tri sonoj; do mi = o, ci = e, li = i. Por pluralo ne estas bezonaj novaj pronomoj; kial ne procedi ĉe ili egale kiel ĉe la aliaj vortoj? Ni aligos simple finaĵojn de pluralo —n. Poste estos ni = on, vi = en, ili = in.

Deklinacio estos tre simpla. La kazoj estu kvin, nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, instrumentalo; vokativo ne estas bezona, ni voku per nominativo tre oportune kiel multaj lingvoj aliaj. (En la panglotio estis Comenius pli radikala, tie li volis, ke sufiĉu tri kazoj.)

Finaĵoj de deklinacioj estos vokaloj i, e, a, o.

Estos do jena deklinacio:

O (mi)	o	oí	oe	oa	oo
On (ni)	on	oní	one	ona	ono
E (ci)	e	eí	ee	ea	eo
En (vi)	en	ení	ene	ena	eno
I (li, ŝi, ĝi)	i	íi	ie	ia	io
In (ili)	in	iní	ine	ina	ino

Laŭ formado de tiuj ĉi pronomoj estos deklinaciataj ĉiuj nomoj egalmaniere. Ekzemple, se El signifus Dio, estus deklinacio jena (singularo kaj pluralo):

el	eli	ele	ela	elo
elon	eloní	elone	elona	elono

Se estus kreita vorto e la, diino, ĝi estus deklinaciata sekve:

ela	elai	elae	elaa	elao
elan	elaní	elane	elana	elano.

## Muzikfestivalo de Praha

De la 10-a ĝis la 28-a de majo okazis en Praha la internacia muzika festivalo, nomata »La printempo de Praha«, kies bela tradicio estis renovigita la pasintan jaron kun tre bona sukceso. — Kvankam oni ne kalkulis kun pli multnombra ĉeesto ankoraŭ tiujare — ĉar multaj eksterlandaj artistoj ne povis partopreni pro la ĉiam ankoraŭ daŭrantaj valutaj malfacilaĵoj — la sukceso estis tamen neatendite tutkora, unuanima. Venis niaj malnovaj amikoj, venis novaj gastoj, por forlasi nin kiel amikoj.

La koncertoj okazis krom en la du ĉefaj koncerthaloj ankoraŭ en kelkaj aliaj, malpligrandaj, plue sur historiaj lokoj kiel en la ĝardeno de la vilao Bertramka, kie vivis Mozart, en la reĝa ĝardeno de la somera kastelo Belveder, en la ĝardeno de la palaco Valdštýn, en la baroka preĝejo de Loreta k. a. La kantludoj okazis en la du ŝtataj operoj.

La sidejo de la festivalo estis la »Domo de artistoj«, kie okazis ankoraŭ la plejparto de koncertoj. Granda flago super la enirejo, kun blanka inicialo F en helblua kampo anoncadis la solenan okazaĵon. Ĉirkaŭ la bela placo antaŭ la

Ni memoras, kiamaniere estis skizita konjugacio de la verbo „esti“ (e g e s ktp.). Comenius en Provo pri la nova harmonia lingvo efektivas tiun ĉi konjugacion sen helpo de la latina. Ni metu, ke b a n signifas esti, ke prefikson F ni prenas por futuro, prefikson P por preterito; a = mi, e = ci, i = li; pluralo estas esprimata per longigo; á = ni ktp.; poste oni kunjugacios:

Prezenco:

bana bane bani; baná bané baní

Preterito:

pabana pabane pabani; pabaná pabané pabaní

Futuro:

fabana fabane fabani; fabaná fabané fabaní

Sumigante skribas Comenius en la fino: Nova lingvo devas esti tiom racia, harmonia kaj esence ĉionscienca, ke iu ĉionsciulo sukcesus ĝin renovigi, se ĝi estus perdiĝinta.

Ni ja ne havas la pansofion (ĉio-sciencan) kaj tial ni ne povas renovigi tiun ne finitan lingvon. Comenius ja mem en sia nefinita verko ne efektivigis konsekvencajn la samajn principojn en la Panglotio kaj en la Provo, sed li prezentas al la leganto por primedito siajn (iam laŭokazajn) pensojn. La leganto ekzemple rimarkis, ke eĉ en niaj nemultaj specimenoj estas du principoj por pluralo: iam sufikso —n, iam longigo de vokalo.

Hodiaŭ jam al neniuj venos ideo, konstrui artefaritan lingvon laŭ skizoj de Comenius. Sed la sorto, kiu tiom foje trafis lin maljuste, maljustis al li ankoraŭ pro tio, ke lia Panglotio restis dum jarcentoj perdita. Aliokaze havus Comenius fiksan nomon en historio de artefaritaj lingvoj, kie li estus preskaŭ nekonata!

Tradukis S. K.

domo, kun la fama statuo de Ŝtursa »La vundito«, meze en bedoj de diverskoloraj tulpoj, flirtis alten la flagoj de ĉiuj reprezentitaj landoj. Kaj vespere, kiam la komenco de la koncerto alproksimiĝis, alfluadis per la larĝa, impona ŝtuparo amaso da homoj de ĉiu flanko kaj en la koridoroj oni povis aŭdi ĉiujn lingvojn. La plejparto estis feliĉuloj, kiuj havis enirbileton. Sed estis ankoraŭ optimistoj, kiuj ne havis ĝin, sed tamen venis kaj sukcesis penetri per afableco de kompetentaj personoj. Fine estis entuziasmoj, kiuj ne havis bileton, ne sukcesis penetri, sed estis feliĉaj, ke ili povis aŭskulti malantaŭ la pordo, pie, senspire, por ne perdi eĉ unusolan tonon.

Senpere reprezentitaj estis jenaj landoj:

Anglio: La Filharmonia kvarteto.

Aŭstrio: Friedrich Gulda, pianisto.

Ĉinujo: Chow Shiao-Yen, sopranistino; Lee Hsien-Ming, pianistino.

Francio: Walter Ducloux kaj Charles Munch, direktantoj; Jaques Février, pianisto; Pierre Fournier, violonĉelisto.

Italio: Alberto Poltronieri — en la juĝantaro pri konkurso de la Kubelik-premio.

Palestino: Georgo Singer, direktanto.  
 Rusio: Eugen Mravinskij, direktanto; Dimitrij Ŝostakoviĉ, direktanto kaj pianisto; David Oistrach, violonisto.  
 Svisio: Ernest Ansermet, direktanto.  
 Turkio: Ulvi Cemal Erkin, direktanto.  
 Usono: Leonhard Bernstein, direktanto kaj pianisto; Yehudi Menuhin, violonisto; Hepzibah Menuhin, pianistino; Rifiardo Odnoposoff, violonisto

krom la delegitoj de la laborkunsidoj.

Estis luditaj verkoj de aŭtoroj de jenaj landoj:  
 Anglio: William Walton.

Aŭstrio: Wolfgang Amadeus Mozart.

Belgio: Eugène Ysaÿe.

Bulgario: Veselin Atojanov.

Cinio: Lao Chin-Cheng, Ho Lu-Ting, Liu Sheau, Kian Wen-Yeb.

Francio: Claude Debussy, César Frank, Arthur Honegger, Joseph Kaminski, Maurice Ravel, Albert Roussel.

Italio: Niccolò Paganini, Giuseppe Tartini.

Hungario: Béla Bartók.

Germanio: Johann Sebastian Bach, Ludwig van Beethoven, Johannes Brahms, Theodor Schaefer.

Palestino: Paul Ben Chaim (unua prezentado de »Du simfoniaj frazoj«).

Polio: Jan Maklakiewicz (unua prezentado de »Koncert-Antaŭludo«). Witold Rudziński (unua prezentado de »Noneto«, dediĉata al la Ĉeĥa Noneto okaze de ĝia koncert-vojaĝo tra Polujo pasintan jaron).

Rusio: Alexander Ĉerepnin, Alexander Konst. Glazunov, Michael Ivanoviĉ Glinka, Aram Ĉaĉaturjan, Nikolaj Metner, Sergĕj Prokofjev, Igor Stravinskij, Dimitrij Ŝostakoviĉ.

Hispanio: Hector Villa Lobos, Pablo de Sarasate.

Svisio: Frank Martin.

Turkio: Ulvi Cemal Erkin.

Usono: Aaron Copland (la unua eŭropa prezentado de lia »III-a simfonio«).

El nia lando partoprenis la plej bonaj muzik-korpusoj, direktantoj, muzikistoj, kantistoj. Inter komponistoj estis reprezentitaj tiuj de la 17-a jarcento komencante, ĝis al la plej novaj.

Al la festivalo ligis sin ankaŭ aliaj entreprenoj:

Konkurso en violonludo pri la Kubelík-premio. En la juĝo partoprenis krom du enlandaj membroj: Maurice Hewitt, prof. de konservatorio en Parizo; Alfred Poltronieri, prof. de konservato-

rio en Milano kaj primario de kvarteto de lia nomo, konata al ni bone el la tempo antaŭmilita, David Oistrach, profesoro en konservatorio en Moskva, bone konata al ni jam de la pasintjara festivalo, kaj Rifiardo Odnoposoff, violonisto el New York, kiun ni aŭdis la unuan fojon sed esperas havi tiun plezuron nun pli ofte. Bedaŭrinde la eksterlandaj partoprenantoj de konkurso ne povis alveni, pro kio oni decidis ne doni tiun jaron la premion kaj oni taksis nur la ludon de enlandaj partoprenintoj. La unuan rekonon ricevis juna, sed jam bone konata violonisto Evžen Prokop. Alia grava kaj interesa okazaĵo estis la mondkongreso de la muzikverkistoj. Malgraŭ la jam menciitaj vojaĝmalfacilaĵoj partoprenis preskaŭ kvindek eminentaj eksterlandanoj. En la ses laborkunsidoj paroladis: por Rusio: Dimitrij Ŝostakoviĉ, por Anglio: Alan Bush, por Usono: Dr. Sprague-Smith, por Polio: Dr. Stefania Lobaczewska, por Bulgario: prof. Kamburov, por Hindujo: Naranyana Menon, por Palestino: Frank Pollak, por Turkujo: Halil Bedi Yünetken, por Italio: prof. Cavallini, kaj aliaj. En la kunsidoj estis pritrakitaj la plej diversaj kaj plej interesaj problemoj de la muzika kulturo. La liberan tempon pasis la gastoj en la rondo de iliaj enlandaj amikoj, ĉirkaŭitaj per plej granda atentemo kaj zorgo, ke ĉiuj sentu sin ĉe ni hejme.

El la nombro de ekspozicioj okaze de la festivalo mi mencias almenaŭ tiun de la majstroarĉo-instrumentoj, inter ili precipe la faman violonon de la fama Jan Kubelík. Estas la violono, konstruita de la konata majstro itala Stradivari di Cremona en la jaro 1715 kun la nomo »Emperor«, ĉar Stradivari baptis ĉiun sian instrumenton. Jan Kubelík aĉetis la violonon en la jaro 1910 en Londono por tiam fabela prezo de ses mil anglaj libroj, t. e. tiamaj preskaŭ kvarono de miliono de aŭstraj kronoj, kaj alportis la instrumenton la 24-an de decembro 1910 al sia sidejo, kastelo Býchory. Depost tiu tempo Jan Kubelík vivis kaj laboris kun tiu ĉi instrumento, t. e. plenajn dudeknaŭ jarojn. Oni supozas, ke li havis ĝin en la mano entute ĉirkaŭ 11.000foje kaj publike almenaŭ 5000foje. La lastan fojon li tuŝis ĝin sabate la 11-an de majo 1940 kaj sep monatoj pli poste li forlasis tiun ĉi mondon.

Mi esperas, ke venontan jaron mi povos doni ankoraŭ pli ĝojigan raporton pri nia jam tradicia »Printempo de Praha«.

Anna Tarantíková.

## La haveno Praha

Post tiu ĉi milito aperis ĉe ni nova speco de fremdlandaj gastoj, la akompanantoj de eksterlandaj ŝarĝaŭtomobiloj. Estas nekutima rigardo, antaŭe nevidita: alvenas grandegaj aŭtoj el landoj kaj urboj plej diversaj, el Belgio kaj Norvegio, el Stockholm, Köbenhavn, Venlo kaj Rotterdam, el Svislando, iam el Rumanio, sed ĉiuj laŭ unua aspekto venantaj de malproksimo.

Fenestroj tremas, kiam ili traveturas rapide, kvankam pezaj, ĉar plenegaj da sialandaj varoj, la stratojn de Praha kaj kiam ili revenas hejmen kun ŝarĝo de produktoj ĉeĥoslovakaj. Kutime estas duopo, ĉar preskaŭ ĉiu aŭto tiras post si plian veturilon, iam ege longan kaj duetaĝan, transportantan ekzemple tutan serion de brilantaj personaj aŭtoj ĉeĥaj.

Pro diversaj kaŭzoj, la nebone funkcia fero vojo kaj ĝia multekosteco (la transporton tra Germanio ni devas pagi per tintantaj dolaroj usonaj) kaj nesufiĉa trafiko ŝipa, estis farita tiu ĉi aranĝo, kiu tamen sendube daŭros ankaŭ dum tempo normala.

Ni, loĝantoj de Ĉeĥoslovakio, meze en la kontinento, malproksimaj de la maro, kun des pli forta deziro rigardas al landoj foraj, por ni nefacile atingeblaj. Niaj dokoj (aŭ »doketoj«) sur la rivero Vltava ĉe la norda rando de Praha, la vico da grupoj ŝarĝantaj kaj malsarĝantaj nian modestan ŝiparon, estas nia fiero. Ni ŝatas rigardi ilin kaj enspiras plennaze la salan aeron maran, kiun laŭ nia fantazio tiuj ŝipoj alportas kun si el Hamburgo.

Kaj nun ni havas plian havenon en Praha kaj feliĉe en mia pleja proksimo. La diritaj eksterlandaj ŝarĝaŭtoj kunvenas — pro ia interkonsento aŭ ordono — ĵus en mia strato. Estas regiono neĝrava, absolute ekstercentra, sed feliĉa sorto elektis ĝuste mian straton Stárkova por rendezveuo de tiuj fremdaj veturiloj kaj fremdlingvaj homoj.

Jes, nia strato svarmas de norvegoj, nederlandanoj, iam de rumanoj, belgoj, danoj kaj de anoj de aliaj ŝtatoj. Kaj ni havas antaŭ ni ĉiutage Babelon. Kutime estas ĉiam sole du, kiuj

interkompreniĝas, la ŝoforo kun sia akompananto aŭ dufoje du, se kunvenas du aŭtoj samlandaj. Ili laŭte kaj vive parolas, sed ĉesas ilia viglo, kiam ili ekrilatas kun la loĝantoj de Praha. Estas aspekto malgajiga, kiam tiuj viroj, grandaj kaj fortaj, gestas kaj balbutas por havigi al si helpon de sia ĉirkaŭaĵo. Ili fariĝas kvazaŭ senkonsilaj infanoj. Ilia rilato limiĝas ja kutime al kelneroj, kiuj alportas fine post rezigna mansvingo de la mendantoj kutime manĝon laŭ sia propra juĝo. Iam provas la eksterlandanoj uzi la lingvon germanan, ŝatatan nek de ili nek de la aŭskultantoj.

Kaj la fremdaj aŭtistoj volas rigardi la urbon, kiu ja estas laŭ esprimo de kompetentuloj rigardinda. Sed da stratoj estas tro multe kaj iuj kondukas al kvartaloj neniel interesaj. Ni rimarkas tial ofte niajn nederlandanojn, svedojn aŭ rumanojn post nelonga senrezulta vagado, simila al tiu de perditaj ŝafoj, reveni al siaj aŭtoj en strato Stárkova aŭ al sia hotela ĉambro en la proksimo. La Praha-anoj estas ja popolo gastama, sed kion ili faru kun mutuloj aŭ kun homoj, eligantaj vortojn nekompreneblajn?

Je kio alia estus la farto de anoj de tiu eksterlanda popolo aŭtomobilista, se ili sciuz paroli Esperanton! Kiom da amikoj kaj da helpantoj ili trovus en ĉeĥoslovaka ĉefurbo! O. G.

## LOKAJ INFORMOJ

**Baŭov.** — La 22-an de majo finiĝis kurso kun 22 p. Gvidis F. Omelka.

**Bratislava.** — La jarkunveno de Klubo de slovakaj turistoj kaj skiistoj (KSTL) salutis en nomo de Slovaka Esperanto-Societo ĝia prezidanto Pavel Rosa. Inter la ĉeestantoj estis prezidanto de Slovaka Nacia Konsilantaro (Slovenská národná rada) dr. J. Lettrich, kiu promesis helpon al nia movado. — Porinfana gazeto Priatel' dietok enhavas E-kurson, ilustrita revuo Slovenský svet E-rubrikon kaj kurson, gvidatan de redaktoro J. Zálupský.

**Brno.** — Librovendejo B. Komárka en Česká str. aranĝis plaĉan ekspozicion de esp. libroj dum pli ol 10 tagoj. La efektive tre plaĉa aranĝo konstante allogadis multajn preterpasantojn sur la ĉefstrato. — En solenaj kaj koncertaj kunvenoj de la Klubo violonis majstro J. Geryk, pianon ludis komponisto kaj kapelestro V. Scheiber, rave kantis Zorka Mázlová ariojn el Vendita fianĉino kaj Najado. — En societo por plialtigi la kulturan konscion de virinoj (Akce pro politické a kulturní uvědomění žen) parolis pri Esperanto s-ino Magda Jelinková.

**Dolní Suchá.** — Neŭtrala Esperantista Asocio okazigis sian ĝeneralan kunvenon la 2-an de marto. Estis reelektita la komitato: prez. Emilo Klímsza, sekret. Emilo Przewczek, kas. Jozefo Cieslar. La sekretario parolis pri la temo: 60-jara jubileo de Esperanto. La prezidanto dankis al la laborintoj por la ĝisnuna subteno.

**Cheb.** — La tolaĵfabriko ADA sendis laŭ propono de nia membro Fr. Patera, prezidanto de la fabrika konsilantaro, 6 plej diligentajn laboristojn al Somera Esperanto-Lernejo en Doksy. La fabriko donas subtenon de 6000 Kčs, la reston de la kosto pagas la fabrika konsilantaro.

**Karlovy Vary.** — Je la fino de la lernejo-aranĝas la loka grupo de EACS en Karlovy Vary la Esperanto-kurson por 24 komencantoj. Gvidas František Milek. — La 15-an de majo estis malfermita la „Esperanto-hejmo“ per intima vespero. Pianon bele ludis la blinda samideano M. Emmer la juna, violonon lia patro, la klubestro, kiu estras la nomatan banejdomon. La samideanoj estis gastigitaj per teo. „Esperanto-hejmo“ atendas siajn E-gastojn.

**Košice.** — La 16-an de aprilo 1947 fondiĝis loka grupo de SES kun 27 membroj. Komitato: prez. A. D. Kremer, vicprez. V. Murgaš, sekret. E. Kremerová, protok. J. Naď, kas. M. Pustelníková, bibl. J. Galica. Revizoroj: Ct. Bobula k. J. Tomašovič. Ceteraj komitatanoj: M. Amrčichová, V. Bissová, G. Valenta, Ct. Vadaš. Kunvenoj ĉiumerkrede inter 18-a kaj 20-a horo en Národní klub, strato Štefánikova 12/I. En marto finis A. D. Kremer kurson kun 10 lernantoj, kiuj aliĝis al SES. Nun li gvidas kurson kun 12 gestudentoj de la agronomia kaj komerca lernejoj.

**Michalovce.** — Loka grupon de SES gvidas prezidanto Južo Beňo kaj sekretario Michal Hvizďák.

**Olomouc.** — Ĝenerala kunveno de la Esperantista societo okazis la 24-an de aprilo. Laŭ raporto de sekretario la agado rapide disvastiĝas. La membroj tradukis Carton de Unuigita Naciaro. Ili kolektis pli ol 1500 subskribojn por la Petskribo. Societo havas 98 membrojn. La biblioteko estas deponita en urba Hus-biblioteko, ĝi enhavas 368 volumojn. La kasista raporto estas favora. La lernejestro Jedlička estis komisiita fondi filion de la Societo en la antaŭurbo Hodolany. La propagandisto bezonas kunlaborantojn por la gvidado de gazetaj rubrikoj. Kiel unua sekretario estis elektita s-ano Jos. Vašek, Polská 2, kassistino Marie Kubová, Bystrovanská 54, ceteraj komitatanoj restis sen ŝanĝo. — La 17-an de majo estis vespero je honoro de 25 novaj samideanoj, kiuj finis la kurson en Dobrovského vyšší škola lidová. Ĉeestis ankaŭ la studentoj de Vyšší škola lidová el Šternberk, gastoj el Praha, Hradec Král., Prostějov, Píseň, Litovel, Zlín kaj aliaj lokoj, entute pli ol 150 ĉeestantoj. Por la sukceso de la vespero plej multe meritis nia bulgara samideano kamera kantisto Nuni Nanev kaj s-ino Skládalová kun virina horo de Pötingeum. La kurso ricevis atestojn. Sekvis danco. La vespero bonege sukcesis. — Dimanĉe antaŭtagmeze en kunveno kun ekster-olomoucaj gastoj oni traktis pri aktualaj aferoj. Poste oni montris al ili la riĉajn konstruaj-memorajojn de Olomouc. El la turo de Maúric-preĝejo ili ĝuis belegan rigardon al la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. — La samideanoj de Olomouc gajnis novan fervoran esperantiston en kamera kantisto, estinta mem-

bro de la opero en Sofia s-ro Nuni Nanev. Tiu ĉi bulgaro loĝas jam kelkajn monatojn en Olomouc kaj entreprenas kant-koncertojn en la tuta lando, akompanata de sia edzino, pianistino.

**Ostrava.** — Ĝenerala kunveno de Rondeto de esperantistoj en Slezská Ostrava okazis 12-an de aprilo kun partopreno de 35 membroj. Kultura sekciestro estis elektita Ant. Šrámek, Ostrava, Karolinská 623/5, al kiu oni adresu ĉiun korespondadon.

**Praha.** — S-ino J. Šupichová prelegis 25-an de majo 1947 pri Zamenhof kaj lia verko en jubilea kunveno de instruistinoj, kiuj festis 40-jaran datrevenon de sia matur-ekzameno.

**Svit.** — La skoltoj fondis lokan grupon de SES.

**Šternberk.** — La 9-an de majo finita en Alta popola lernejo kurso kun 15 partoprenantoj, gvidita de Antonín Harna. Regulaj kunvenoj ĉiun unuan merkredon en monato en restoracio „Ŭ nás“, proksime de la stacidomo.

**Tábor.** — Esperantista klubo komune kun la loka Reklub aranĝis la 25-an de aprilo lumbildan paroladon: Svedlando, Laponlando, Narvik de Josef Vítek el Hradec Králové. Partoprenis 220 personoj. La 26-an de aprilo okazis la sama parolado dufoje por la lernejoj de Tábor

## NI LEGIS

Vortojn de sveda princo Wilhelm, skribitajn dum la milito „al la ĉeĥoslovaka popolo“, ni legas en esperanta traduko en la „Okcidentveda saluto“ (nro 4, Värmlands-gat. 18, Göteborg):

Popolo, kiu kredas al leĝo kaj justec' en la kvartalo de liberec'.  
Eble oni povas devigi al reiro ĝin sed neniam oni povas ĝin subigi.  
Ĝi revenos hejmen ree je la jubilea tago de venko kiel malmoligitaj honorkronitaj viroj, al liberigita Praha.

En organo de la New-Zealand-Esperanto-Asociation (sekr. f-ino Joyce Wilson 6 Clifford street, Karori, Wellington, W. 3) ni legas en numero el junio 1946 angla-lingvan artikolon, kiu denove atestas pri la fakto, ke en la internaciaj kongresoj povas la kongresanoj libere diskuti sole, se oni uzas Esperanton. Se la angla kaj franca kaj la ceteraj lingvoj estas uzataj, ĉiam estiĝas malatento, eno, miskompreno. Ni enskribas tiujn, cetere al ni konatajn faktojn, pro tio, ke oni nun tiom ofte legas ilin en anglaj gazetoj, do de verkantoj en la lingvo, kiu estas efektive tutmonda, kaj tamen neuzbla por internaciaj rilatoj, efektive demokrataj.

Pri la prelegoj de prof. Jan Filip en Nederlando aperis en Nederlanda katoliko el februaro nederlandlingva artikolo el kiu ni citas:

„Ne estas malfacile al ni deklari, ke la vizito de prof. Jan Filip al la malalta lando apudmara fariĝis morala sukceso. Ĉiokaze parolis la praktiko. Estas ankaŭ nediskuteble, ke ni faris per tiuj ĉi kulturaj vesperoj altnivelan propagandon por esperanto inter esperantistoj kaj aliaj interesigantoj. — Sed ĉu vi, kiu jam konas la lingvon, ne intense ĝuis la simplajn sed ĝuste pro tio tiel belajn vortojn, kiujn ĉi tiu ĉeĥa pastro uzis por rakonti al vi pri sia naskiĝlando en milito kaj paco? Ĉu via spirita horizonto ne multe plivastiĝis, kiam li skizis por vi la historian evoluon kaj nunan situacion de la tiom pridiskutita Ĉeĥoslovaka respubliko? Ĉu vi ne interesiĝe sciiĝis pri liaj vortoj rilate al la punktoj de akordiĝo sur ĉia tereno inter Nederlando kaj Ĉeĥoslovakio? Ĉu vi jam konis tiujn specialaĵojn, kiujn li sciiĝis al vi en sia prelego pri la disvastiĝo de la tiea kristanismo?“

La juna vivo, monata organo de „Tutmonda Junular-organizo“, aperas regule en West-Grafdijk (Nederlando) kun tre bona enhavo, kiu estas interesa legaĵo por ĉiu, kiu fininte la kurson bezonas perfektigi en la lingvo. — Abonojn akceptas Asocia Libro vendejo en Praha XIX, Uralské náměstí 9, Jarabono KČS 30.— Ĝi estas la plej malkara gazeto.

kun ĉeesto de proksimume 1400 personoj. La parolado havis grandan propagandan valoron. La direktoroj de lokaj mezlernejoj rekomendas aranĝon al ĉiuj lernejoj. Samtempe kun la parolado aranĝis la Esperantista klubo en ĉefa strato de Tábor grandan montran ŝrankon propagandan. La reklamfolieto, el kiu ni ekscias pri tiuj paroladoj, mencias multloke, ke la vojaĝon ebligis Esperanto. En la urbo daŭras 3 kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

**Tanvald.** — Ankaŭ en tiu ĉi malgranda urbo apudlima progresas nia movado. Malgranda grupo kunvenas regule ĉiun merkredon en hotelo Central. Bona okazo por esperantlingva konversacio. Dum la nacia pilgrima festo la 11-an de majo preparis la grupo malgrandan ekspozicion, kiu vekis vivan intereson ĉe publiko. Precipe la junularo admiris la eksterlandajn bildkartojn, poŝtmarkojn kaj prospektojn. Estis kolektitaj 50 subskriboj por la petskribo al UNO.

**Turĉiansky Sv. Martin.** — Kurso finiĝis la 25-an de marto. La kursanoj fondis lokan grupon de SES. La klub-ejo estas en la Domo de la Ruĝa Kruco, Kuzmány-str. 29. Kunvenoj ĉiumerkrede. Nova kurso daŭras depost 21-a de aprilo, gvidata de J. V. Dolinský. Prezidanto J. V. Dolinský, lernejestro, sekretario Peter Ondrejčka, studento gimnazia, kasisto Ján Koreň, bankoficisto. (E. S.)

Pri la finaĵoj —aj kaj —oj. Sufiĉe ofte oni renkontas personojn, kiuj konsideras la multajn —aj kaj —oj en Esperanto kiel „barbarajn malbelaĵojn“. Kontraŭ tiuj personoj povas esti utila la argumento, ke kaj la latina kaj la greka lingvoj ankaŭ posedis tiujn plural-finaĵojn. Kaj certe neniu kuraĝas nomi tiujn lingvojn „barbaraj“. — Ekzemple en latino bona e femina e (esp. bonaj feminaj) estas la plurala formo de bona femina (bona virino). En la greka tiuj finaĵoj abundas. La pluralo de la greka kyklos (rado) ekzemple estas kykloj, kaj neoj anthropoj, neaj thyraj signifas respektive junaj homoj kaj novaj pordoj. La aserto, ke tiuj finaĵoj estas nenaturaj do disfalas pro sia absurdeco. Ne nenaturaj ili estas, sed molaj, klaraj kaj unusencaj! (E. Vilborg, La Espero, marto.)

**Dezirindaĵoj.** Tro da aferoj efektiviĝas tute hazarde, laŭ personaj ideoj kaj iniciato, sen ia laŭplana preparo. Ni ne malkonfesas, ke tiel plenumiĝis gravaj aferoj. La laŭdinda iniciato de s-ro Sirjaev kaj de Literatura Mondo havigis al ni gravan verkon, kiel la Enciklopedio de Esperanto, al la aĝemo de s-ro Lanti ni ŝuldas la Plenan Vortaron, ktp. Sed aliflanke gravaj aferoj restis ne plenumitaj. En 1926 s-ro Dietterle aranĝis statistikon pri la nombro de la esperantistoj en la tuta mondo. Treege utila laboro! Sed kie estas la instanco, kiu zorgas pri ĉiujara aŭ almenaŭ ĉiukvinjara renoviĝo aŭ kompletigo de tiu statistiko? De tiam pasis jam 20 jaroj! Kaj kiam ni nun en propaganda verko aŭ aliloke deziras publikigi ciferojn pri nia movado, ni devas uzi tiujn de 1926.

Sama estas la afero koncerne la literaturon. Dank' al la Bibliografio de Internacia Lingvo, de Stojan, ni scias la nombron de la libroj, aperintaj ĝis 1926. Sed kia estas la nuna stato? Ĉu ne strange aperas la fakto, ke en aktualaj verkoj oni trovas ciferojn tiom malnovajn? Jen denove tasko por internacia instanco.

Lastatempe aŭdiĝis voĉoj pri enciklopedio en Esperanto. Tia verko ja estus grava por la tuta esperantistaro. Tial estus bone, ke tutmonda instanco iniciatu kaj gvidu ĝian aperigon.

La verko Historio de la Lingvo Esperanto de Edmond Privat pritraktas la movadon ĝis 1927. Nova volumo aŭ almenaŭ suplemento pri la periodo 1927—1947 estas dezirinda... Ni opinias, ke tutmonda instanco devas gvidi tiajn aferojn.

Tiu instanco devos iniciati, proponi, konsili, plani kaj gvidi. (G. P. de Bruin, Enschede, en Flandra Esperantisto, januaro 1947.)

**Gaso.** Ĉu vi scias, ke la tute internacia vorto gaso (angle, germane, hispane, itale, ruse gas, france gaz) estas artefarita? Ĝi estas konstruita de la holanda kemi-

isto kaj kuracisto van Helmont (1577—1644). Li prenis kiel elirpunkton la grekan vorton chaos (esp. haoso). La greka chaos origine signifas faŭko. (La Espero, februaro 1947.)

**Basic English** al siaj 850 vortoj en la kompleta lingvo aldonos vortaron kun 7500 plej oftaj vortoj, ĝeneralan vortaron de 25.000 vortoj kaj vortaron kun 10.000 sciencaj terminoj. (La Espero, januaro 1947.)

**Radio.** La ĉeĥoslovaka legacio en Kopenhavn atentigis la Esperanto-organizon danan pri la esperantaj disaŭdigoj de la radiostacio Praha kaj invitis al aŭskulto.

(Dansk Esperanto-Blad, majo 1947.)

La aprila numero de la **Svenska Esperanto-Tidningen** alportas sur sia unua paĝo bildon de Praha kaj en la kajero mem estas invito al la Tutmonda kongreso junulara, okazonta en Praha inter la 20-a de julio kaj 17-a de aŭgusto 1947.

La **Progresanto** estas bone redaktata revueto kun la celo perfektigi en Esperanto la laboristaron nederlandan. Kvankam ĝi estas verkita plejparte en lingvo nederlanda, ni trovas en ĝi ofte partojn interesajn kaj utilajn ankaŭ por ni. En la aprila numero H. Velthove prezentas i. a. interparolon de du lernantoj, kiamaniere pruvi, ke sumo de la anguloj de trilatero egalas duortan angulon. Problemo simpla geometrie, sed estas por ni necese scii ĝian klarigon ankaŭ per klaraj esperantaj esprimoj. Tiu ĉi artikolo perfekte tion instruas.

La **28-a kongreso de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj** en la regiono de la nederlanda lingvo okazis dum la pasko en Heerlen kaj ĉeestis, kiel ni legas en Laborista Esperantisto el 1-a de majo, 105 delegitoj, 268 membroj kaj 30 gastoj, do sume 403 personoj. Tio estas nombro tre impona, komparante ĝin kun nombroj de ĉeestantaro en nialanda kongreso kaj en niaj multaj regionaj konferencoj kaj laboristaj kunvenoj. La prezidanto Sterken akcentis en sia malferma parolado, ke ni esperantistoj estas pioniroj por humaneca idealo. La kongreso akceptis sekvan rezolucion, kiu estis sendita al ĉiuj specaj laboristaj organizoj, partioj kaj instancoj, al la registaro, parlamentanoj k. c.:

„La kongreso konsiderante, ke la evoluo sur ekonomia, kultura kaj politika tereno necesigas al internacia kunlaboro kaj kunordigo;

opiniante, ke la lingvodiverseco formas gravan baron kontraŭ sana evoluo de la internaciaj rilatoj, kaj la uzo de naciaj lingvoj prezentas nenian solvon por la lingvo-problemo;

konsiderante, ke Esperanto kiel neŭtrala kaj internacia lingvo praktike plene pruvis siajn taŭgecon kaj uzeblecon, neniel tuŝas la naciajn prestiĝon kaj dignon kaj ke ĝia strukturo igas ĝin lernebla kaj aplikebla por ĉiuj nacioj;

## ESPERANTISTA VIVO

**Sonja Portnová**, iama membrino de Esperantista klubo en Praha, edziniĝis (laŭ Argentina Esperantisto okt.-dec. 1946, kiu venis nun en niajn manojn) en Argentino kun samideano Kurt Milkuschutz. Gratulon!

## Eksterlanden ekskluzive esperante!

(Atentigo represinda — esperante! — en la fino de ĉiu lernolibro pri Esperanto.)

Se vi ion petas de fremdulo, se vi ion proponas al li, mallonge, se vi serĉas propran profiton en eksterlando, vi nature devas skribi en la lingvo, komprenata de la fremdulo, de kiu vi ion volas, vi devas korespondi kun li plejparte en lia nacia lingvo. — Sed, se vi kiel kliento ion mendas en fremdlando, se vi faras servon utilan al la fremdulo, neniam uzu lian nacian lingvon, sed ĉiam uzu ekskluzive neŭtralan

konsiderante krome, ke kreskanta nombro da ŝtatoj kaj internaciaj korporacioj, komprenante la bezonon pri lingvo internacia kaj la uzeblecon de Esperanto por tiu ĉi funkcio, pretas apliki en siaj internaciaj rilatoj tiun ĉi lingvon; urĝe rekomendas al la registaro kaj al ĉiuj koncernaj instancoj:

1-e konsideri la instruon de Esperanto en la instruistaj seminarioj kaj ebligi la instruadon de Esperanto en la lastaj klasoj de la elementa lernejo;

2-e esplori la eblon de internacia konvencio pri la akcepto kaj uzo de Esperanto.“

**Literatura Mondo** en sia dua kajero prezentas materialon multe pli interesan ol en la unua. Precipe en la „Observo“ ĉiuj artikoloj estas tre legindaj kaj tre instruaj. En la kajero estas du poemoj de nia kunlaboranto K. Piĉ, originala „Meditado super la prospekto de la Literatura Mondo“ de dr. Pumpr en rubriko „Salo kaj Pipro“ kaj tradukaĵo de Pumpr el Seifert. Waringhien tre saĝe raportas kaj kritike taksas la klopodojn pri novaj artefaritaj lingvoj kaj starigas esperantistan empirian teorion pri enkonduko de lingvo internacia kontraŭ tiu de IALA. Rimarkoj pri „Radika transitiveco“ de Alex Kay meritas esti legataj ne unufoje. La beletristikaĵoj ĉiuj havas nivelon tre respektindan.

**Bildon de nia komitatano Vladimír Slaný** el Ostrava enprezis „Esperanto“ en sia maja numero. Ni uzu tiun ĉi okazon por aludi la 25-jaran laboron de samideano Slaný. Nuntempe liaj servoj precipe gravas pro lia prelegado en Radio-Ostrava.

**La luzica popolo**, artikolo de George Agricola, atentigas pri nova lukto por vivo de tiu ĉi la plej malgranda nacio slava. Ni premas la manon de kuraĝa batalanto por homaj rajtoj. Li ne maljuniĝas, lia koro faras lin daŭre juna, ĉar ĝi bolas daŭre por justeco. Ni ne povas ne enskribi tie ĉi la fakton, ke lia protesto en aprilo 1939 en la sama gazeto kontraŭ la invado de germanoj en Ĉeĥoslovakion estis por ni granda konsolo kaj dokumento, ke maljusta afero de Hitleranoj fiaskos. Neŭtraleco kontraŭ maljusto estas krimo, ni scias, kaj la historio konvinkis pri tio ĉiun, kiu povas kaj volas vidi kaj sperti. Kaj tiu sperto konvinkigas nin, ke spite la diversaj abomenindaĵoj en rilatoj inter la homo kaj homo, tamen la justeco venkas kaj venkados ĉiam pli ofte kaj pli konvinke.

**Die Weltsprache**, Wien, germanligva revuo por propagando de Esperanto en Aŭstrio, informas en sia 11-a nro pri la Esperanto-disaŭdigoj de ĉeĥaj stacioj kaj pri la multnombraj kursoj en nia lando. Ĝi citas Česká Lípa, Karlovy Vary ktp. Niaj aŭstraj najbaroj lernis jam uzi la ĉeĥajn lokonomojn kaj tiel ilin lernos ankaŭ la cetera mondo. Ĉesos Karlsbad, Pilsen, Joachimsthal ktp. kaj tiuj lokoj estos tra la mondo famaj kun siaj ĉeĥaj nomoj Karlovy Vary, Plzeň, Jáchymov.

**Haĝi Raden Mustafa**, esperantisto de la insulo Java, kiu antaŭ kelkaj jaroj faris bonan propagandan laboron en nia lando, mortis dum pasko nunjara en Leipzig je pulmomalsano. Dum interparoloj li plurfoje deklaris, ke li estas sincera admiranto de Hitler kaj de la nazismo.

Esperanton, ne zorgante, ĉu la fremdulo komprenas ĝin aŭ ne! Li mem zorgos ja havigi al si tradukon, kaj se li estos tiel devigata serĉi ofte tradukanton de esperantaj mendoj, li aŭ mem lernos Esperanton aŭ serĉos oficiston sciantan esperante korespondadi. La devizo de ĉiu esperantisto estu: Kun eksterlandanoj korespondadi sole en Esperanto! Faru tion ĉiu konsekvence! Komprenable via leteru portu ĉiam atentigon: »En Esperanto« aŭ »Oni korespondas esperante! —ou—



# RICEVITAJ GAZETOJ

Gazetoj, ĉe kiuj estas notita abonsumo en Kĉs, estas mendeblaj por tiu sumo ĉe Librovendejo de EAĈSR.

**Amerika Esperantisto.** Ofic. org. de Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, 114, West Street, New York 11.

**Dansk Esperanto-Blad.** Eldonata de Centra Dana Esperantista Ligo. Administr.: Christianborgvej 1, Randers. Unu n-ro 4 Kĉs.

**Esperantista laboristo.** Dumonata organo de la Labor-Esperantista Federacio. 34, rue de Chabrol, Paris 10.

**Esperanto.** Brána do šťastné budoucnosti světa. Nepravidel. inf. jen pro členy a přátele Klubu esperantistů v Hradci Králové. Řídí Josef Vitek. Multoblig.

**Espero Katolika.** Monata esperanta revuo. Ofic. organo de I. K. U. E. Redakcio: Roelofarendsveen, Nederlando. Kĉs 60.—.

**Flandra Esperantisto.** Organo de Flandra Esperanto-Ligo. Red.: Postbus 342, Brussel.

**Heroldo de Esperanto.** Duonmonata internacia organo de la Esperanto-movado. Eldonas Flandra Esperanto-Instituto, Brussel. Kĉs 100.—.

**Ju-ko,** gazeto de Junularkomunumo de la Asocio de Lab. Esp-istoj. Bestevaerstr. 123 hs., Amsterdam-West.

**La Praktiko.** Den Haag. Provizore ne povas aperi. La abonintoj kaj membroj de UL ricevos libran komponson.

**La Progresanto.** Studienblad van de Bond van Arbeiders-Esperantisten. Roelenstraat 4, Amsterdam-W.

**Sennaciulo.** Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda. Red.: 67, avenue Gambetta, Paris 20.

**Svenska Esperanto-Tidningen La Espero.** Organo de la Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm C. Kĉs 63.—.

**Internacia Kulturo.** Sofia. Kĉs 110.—.

**Literatura Mondo.** Budapest. Kĉs 125.—.

**Esperantisto slovaká.** Eldonas Ján Lamačka. Trenčín. Kĉs 60.—.

## INFORMOJ

**Esperantan vortaron** preparas kelkaj ĉeĥoslovakaj samideanoj kaj eldonejoj, sed la laboro ne progresas sufiĉe rapide, kvankam ni subtenas ĉiujn similajn klopodojn. Ni esperas, ke almenaŭ iu el la vortaroj aperos post tempo ne tro longa kaj ni devas peti la interesulojn pri pacienco.

**Katalogon de Esperanto-literaturo** ni provizore ne povas prepari. Ni informos per nia revuo, kiujn librojn ni povas liveri. Al nia Librovendejo alvenas centoj da mendoj, kiujn ni plenumos laŭ nia ebleco. Tamen ne bonvolu postuli skriban respondon al diversaj demandoj, kiujn ni respondas — ĉar temas pri aferoj de ĝenerala intereso — en nia revuo.

**Esperanto-petskribo al UNO.** Alvenas ĉiam novaj deklaroj. Ni petas niajn kunlaborantojn, ke ili plirapidigu la kolekton de la subskriboj kaj ke ili sendu ilin al ni tuj post la kolekto.

Ĝojigis nin sincere granda sendaĵo de nia amiko F. Omelka, faka instruisto en Bařov. Tiu samideano sukcesis kolekti 3270 deklarojn. Jen ekzempla laboro! Ĝis nun en tiu ĉi fako ne superita duopo en nia respubliko estas prof. Kilian en Třebíč kun samideano Omelka. Tamen ili volonte cedos sian honoran lokon al alia samideano ĉeĥoslovaká. Streĉu viajn fortojn kaj Ĉeĥoslovakio estos unua en la internacia listo!

**Ekzamena komisiono de EAĈSR** sciigas: Per balota aprobo estis elektitaj novaj du membroj: PhDr. Augustin Pitlík, lektoro de Esperanto en Alta teknika lernejo en Praha, kaj Theodor Kilian, profesoro en Komerca akademio en Třebíč. — Josef Friedrich, fervoja ĉefkonsilisto en Brno, demetis funkcion de la membro.

**Tutslovaka Esperanto-Kongreso**, kies okazigon ni anoncis laŭ la maja numero de Esperantisto Slovaka, estis prokrastita laŭ ĝia numero junia.

**Esperanto-unuiĝo „Zaandam Antaŭen“** en la nederlanda Zaandam festos la 35-an jubileon de sia fondo. Inter la 13-a kaj 21-a de septembro 1947 okazos interesa kaj valora programo kaj oni invitas eksterlandajn esperantistojn pasigi agrablan semajnon en tiu tipe nederlanda regiono. Ni gratulus ĉeĥoslovakán samideanon, kiu povus fari tiun viziton. Se la cirkonstancoj, ne permesantaj tiun vojaĝon, estos pli fortaj, tiam almenaŭ sendu salutleteron al komitatanino A. Hazen, Beukenlaan, Zaandam, Nederlando.

**Katalogo de poŝtmarkoj francaj kaj koloniaj kaj Esperanto.** La direktoro de filatela gazeto en Parizo s-ro P. A. Hutin eldonis katalogon de francaj kaj koloniaj poŝtmarkoj kun bonaj ilustraĵoj, nuntempaj prezoj kaj kun klarigoj en Esperanto. La esperantistoj-filatelistoj bonvenigas tiun-ĉi verkaĵon presitan sur bela papero, en kies pluaj eldonoj estos Esperanto pli vaste uzita, se venos sufiĉaj mendoj. La katalogon mendu por 30 francaj frankoj aŭ 3 internaciaj respondkuponoj laŭ adreso: „Courtage Philatelique, 22 rue d'Athènes, PARIS — 9e.“

## NI POVAS LIVERI:

Kardinalo Wiseman: **FABIOLA**, rakonto pri kristanaj katakomboj en antikva Romo. Tradukis E. Ramo. 436 pĝ, ilustrita. Broŝ. Kĉs 86.—, bind. Kĉs 135.—.

Sienkiewicz: **KAPTITAJ EN NUBIO**. Tradukis W. v. Zon. 120 pĝ. Kĉs 40.—.

Ginz-Kamarýt: **ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO**. 466 pĝ, ilustrita. Broŝurita Kĉs 220.—, en bela bindo Kĉs 280.—.

Baur: **SVISA ANTOLOGIO**. Broŝurita Kĉs 220.—, bindita Kĉs 255.—.

Munthe: **ROMANO DE SAN MICHELE**. Broŝ. Kĉs 150.—.

Kalocsay: **ETERNA BUKEDO**. Broŝ. Kĉs 110.—, bind. Kĉs 138.—.

Mendu per poŝta pagilo nro 12.371 „Svaz esperantistů ĈSR, účet knihkupectví, Praha“ samtempe sendante la sumon!

## KORESPONDI KUN ĈS SAMIDEANOJ DEZIRAS

Franjo Wokoun, I., Stara Peščenica 50, Zagreb III, serĉas kamaradon, laŭeble tajloron, por interkorespondi pri polit. k. sindik. aferoj.

Sindikata sekcio „Hotchkiss-Pleyel“ 168, boulev. Ornano, Saint Denis (Seine), Francio, deziras korespondi kun ĉeĥoslovaka sindikata sekcio.

Bob Stam, Guido Gezellestraat 35, Eindhoven, 22-jara, partoprenonta la tutmondan junularan kongreson en Praha dum julio 1947, dez. koresp. kun juna esperantist(in)o en Praha, laŭeble studentino de kemio.

Jarka Ditrich, Uljanik, Jugoslavio, deziras interŝanĝi pensojn pri idealoj.

## NIAJ AKCEPTEJOJ (tria listo)

ps = persone                      tlf = telefone

### Cheb.

S-ro Frant. Patera, Britská 42, tuttage, tlf. 624.

### Ostrava.

S-ro Adolf Staňura, Plynární 5, gasfabriko, ps. 7—15 horo, tlf. 2041.

### Plzeň.

Esperanto-Infirmejo, Pražská str. 8, s-ro L. Svoboda, floristo, sekretario de Okcident-bohemiaj esperantistoj, ps., tlf. 2210.

S-ro František Kavan, str. Alešova 2, vespere.

S-ro Vilém Büchl, str. Palackého 14, ps. 8—16.

S-ro Ladislav Svoboda, str. Pražská, florvendejo, ps. 8—16.

S-ro Josef Hylák, str. Stalínova 48, ps. 8—16.

### Praha-Skoltoj.

S-ro František Buhr, Praha XIX, str. Bělohorská n-ro 187, tlf. 330-41 inter 8—13 labortage; ps. 16—20.

S-ro Stanislav Lešingr, Praha XIV, Pankrác, Libušina tlf. 974-74 aŭ 751-31 labortage inter 8—17, ps. 18—20.

### Prostějov.

S-ro Stanislav Jeřábek, ps. Placo de dro Edv. Beneš 9, tlf. 115, la tutan tagon.

S-ro Svatopluk Chytil, ps. en strato Žižkova 3, tlf. 355, la tutan tagon.

S-ro Adolf Maliček, tlf. 28 la tutan tagon.

### Radvanice.

S-ro Jan Taraba, oficisto, n-ro 390; ps. post la 17a; tlf. Ostrava 2292.

S-ro Ant. Glet, instruisto, n-ro 323 ps. en lernejo.

S-ro Adolf Staňura, tlf. Ostrava 2490.

### Tábor.

S-ro Jožka Škorpil, str. Palackého 235; ps. 8—13, 15—18; tlf. 336.

S-ro Inĝ. Ladislav Krajíc, laborejo Hvozden-ská 1670, ps. 8—12 kaj 13—16; tlf. 435; hejme ps. Jeronýmova n-ro 1984.

S-ro Dro Hugo Jokl, ps. hejme en str. Vančurova n-ro 1813 aŭ en gimnazio Riegrovo n., tlf. 134 la tutan tagon.

### Tachov.

S-ino Reta Vogeltanzová, str. Karoliny Světlé, 798., tuttage.

### Turnov.

S-ino Sláva Valešová, Červenková-str. 850, tuttage, tlf. 245.

### Ústí nad Labem.

S-ro Jaroslav Dušek, labortempe en Střekov, Severočeské tukové závody. Tel. 6151.

S-ro Frant. Mothejzik, labortempe en Poštovi-cejo n-ro 5, tlf. 158.

### Třebíč.

Prof. Theodor Kilian, antaŭtagmeze labortage en Komerca Akademio, ceteran tempon hejme en strato Příční, n-ro 3.

### Vodňany.

S-ro Jos. Slepíčka, Vodňany 696/II, ps. tuttage.

S-ro Václav Trnka, Vodňany 104/II, ps. tut-tage.

S-ro Bohuš Vácha, lernejdirektoro, Vodňany 53/I, ps. 8—11, 14—17 h.

(Kompilis V. Echtner).

**Saluto el Ĉeĥoslovakio.** Ĉarma 16-paĝa broŝureto, enhavanta gajan tekston simplan pri nia lando, akompanatan de belaj kvarkoloraj bildetoj sur kreta papero - aperos en plej proksimaj tagoj. Mendojn kun samtempa paĝo (15.—Kĉs por 1 ekz. al pŝp. konto nro 12.371 Svaz esperantistů ĈSR, účet knihkupectví, Praha XIX) akceptas Libroven-dejo de EAĈSR. Mendu rapide, ĉar baldaŭ disvendigos ĉi tiu unika donacobjekto por via eksterlanda amiko!

## Nepovante al Bern, ni veturu al Doksy!

La »Somera Esperanto-Lernejo« en Doksy fariĝos sendispute unu el la ĉefaj esperantistaj okazaĵoj dum la j. 1947 en ĈSR. Alveturo de la partoprenontoj okazos sabaton la 19. VII., kiam je la 12-a h. komencas la loĝigado, kiu finos je la 12-a h. la 2. VIII. — Programo de la »Lernejo«: 1. Instruado en ĉiuj kursoj je la labortagoj de la 8.30 h. ĝis la 12.30 h., dimanĉon 20. VII. de la 10-a—12-a h.; ekzamenaj testoj okazos la 1. VIII. — 2. Aliaj entreprenoj: 19-an de julio: Interkonatiĝa vespero je la 21-a h. en la hotelo Grand. 20. VII. 9.30 h.: Malfermo al la »Lernejo« per la ĉeĥ-esperanta saluto de la prezidanto de MNV kaj esperantista himno, aŭskultataj sur la ĉefplaco kaj disaŭdigataj per la loka radio. 12 h.: Komuna tagmanĝo en la restoracio »Jelen«. — 20., 21., 22., 24., 25. VII.: Libervola partopreno je la teatra festivalo. (Enirkartoj senpaĝaj.) — 23. VII.: Lampiona festivala dancvespero en la naturparko. — 26. VII.: Esperanta prezentado de »Nokto en Karlštejn« (Jarosl. Vrchlický) en subĉiela teatro je memoro al la 60-jara jubileo de Esperanto. — 27. VII.: Aŭtokaraj ekskursoj al Bezděz kaj Ještěd, kie kunveno kun la esperantistoj de Liberec. — 28. VII.: Vespere ĉe la bivaka fajro. — 29. VII.: Filmvespero. — 30. VII.: Akademio »La nacia kaj artefarita kanto en la ĉeĥa muziko« („Jelen“). — 31. VII.: »Viva gazeto« kaj letervespero. — 1. VIII.: Adiaŭa vespero (Somera karnavalo) ĉe „Jelen“. — La ŝanĝo de la programo rezervita! — Posttagmeze banado, remado, surlaĝa ekskurso al Staré Splavy k. a. — Akceptejo la 19. VII. de la 12-a ĝis la 22-a horo en la stacidomo. — Informejo kaj oficejo de la »Lernejo« en la kursejo (komunuma lernejo, Dr. Beneš-strato). La prepara komitato.

# ESPERANTO V CIZINĚ

V červnu roku 1887 vyšla první knížka o esperantu, Esperantské časopisy na celém světě přináší a budou přinášeti úvahy k tomuto šedesátiletí. My nehodláme použití výročí k slohovému cvičení. Jen připomínáme, že zkušenost ukazuje, jak dlouhé doby bylo třeba, aby se nástroje zjednodušující civilisaci, opravdu rozšířily. Uvedeme jen příklady dva: Gregoriánská oprava kalendáře, provedená roku 1582, byla zavedena v Rusku teprve vládou, vyšlou z revoluce tak hluboké, až v třetím desetiletí století dvacátého. Metrická soustava, vyhlášená podle měření zemského poledníku v letech 1792 až 1799 vládou Velké revoluce francouzské, byla v Rakousku zavedena r. 1876, v Sovětském svazu r. 1927 a v zemích britského imperia a Spojených států severoamerických není pro praxi obchodu a zeměpis zavedena dosud. Konfrontováno s těmito doklady lidského konservativismu je rozšíření esperanta za šedesát let velmi přesvědčující a dává oprávněnou naději, že dojde k takovému rozšíření, jakého je pro pomocný jazyk potřebí: musí se rozšířit nejen mezinárodně, jak tomu už opravdu je, ale musí se rozšířit i masově. I k tomuto hromadnému učení se esperantu dojde patrně ne zásahem nějakých veřejnoprávních autorit, nýbrž rostoucí potřebou bezprostředního dorozumění se neprivilegovaných příslušníků různých národů. Jak se zmenšují vzdálenosti mezi zeměmi naší planety, tak roste potřeba tohoto bezprostředního dorozumívání mezi národy, a to mezi jedinci. Dosud se dorozumívaly mezi sebou jen vlády prostřednictvím profesionálů. A byly z toho dorozumívání dosud vždy války. Stojí za pokus, aby se mohli bezprostředně dorozumívati jednotlivci, jejichž úkolem je jen obyčejná všední práce, ne informace ani propaganda. Stojí za pokus zjistiti, nebude-li z tohoto dorozumívání zase válka. Zamenhof myslel, že ne. Rozhodně stojí za to pokračovati v tomto pokuse.

**Prezident francouzské republiky Vincent Auriol** podepsal petici Organizací spojených národů, již propaguje ústředí esperantských organizací v Londýně. V petici se žádá, aby Spojené národy pomohly rozšiřovati esperanto všemi prostředky, jež jsou poruce, na příklad vyučováním na školách, kde jsou pro to vhodné učitelé, používáním v turistice, mezinárodním obchodu a korespondenci. Z jiných prominentů francouzských podepsali generál De Rippert d'Alauzier a Louis Croses, viceprezident francouzské akademie.

**O Lužických Srbech** přináší informační studii Georges Agricoly orgán Světového esperantského svazu »Esperanto« z května 1947. Studie přináší též mapu lužického území s českými a lužickými místními jmény. Problém Lužičanů lze podle autora řešiti po vzoru situace Retoromančů ve Švýcarsku. Podmínkou je však svoboda obce, opravdová svoboda nejmenší správní jednotky, jak je tomu ve švýcarském spříšezen-

stvu. Základní buňka společenské organizace, o b e c, rozhoduje o svých věcech svobodně podle vůle svých obyvatelů. Použití tohoto primitivního práva pro všechny obyvatele v Německu znamenalo by konstituční zajištění práv také Lužických Srbů, dávajíc jim možnost řídit své věci samostatně ve vlastním životním prostoru. Studie končí esperantským překladem básně Bart-Cižinského. Předchází jí výzva, aby svět obracel svůj zájem i k tomuto malému národu, který nechce zemřít. — My nemůžeme opominouti této příležitosti, abychom nezaznamenali, že týž autor roku 1939 statečně a šlechtěně vznesl protest proti Hitlerovu násilnému zničení Československa. Číslo »Esperanta« z dubna 1939 bylo pro nás v těch dobách útěchou nemalou. Bylo jedno z posledních, jež Němci ještě k nám tehdy pustili.

**Esperantisté pro pomoc Lužici.** Světový esperantský svaz, jenž sídlí v Ženevě, Palais Wilson, byl informován ústředím SPL o lužickosrbském problému a možnostech, vyplývajících z nového uspořádání světa po strašné světové válce, vyprovokované fašistickými státy. — Universala Esperanto Asocio, jehož ústředním orgánem je časopis »Esperanto«, odpovědělo dopisem šéfredaktora Hanse Jakoba, adresovaným Společností přátel Lužice v Praze, jehož český překlad zde uvádíme: „Velmi vážení přátelé, potvrzujeme příjem Vašeho dopisu z 20. července 1946, který jenom pro nepřítomnost podepsaného zůstal až doposud bez odpovědi. Jsa jedním z mála osob na západě, kteří se obírají dějinami slovanských národů, hlavně dějinami západních Slovanů, zvláště pak Lužickými Srby, neboli Vandy, mohu Vás ujistit, že Vaše výzva o pomoc při objasňování osudu statečného opomíjeného slovanského kmene, kmene lužického, ostatnímu vnějšímu světu padla na správnou půdu a zanedlouho sdělím našemu příteli v Praze, který je Vaším zaníceným příznivcem, co mohu učiniti v naznačeném směru. Měřítkem lidské vůle je způsob, podle něhož jsou posuzováni méně silní lidé a národy, nebo podle něhož je s nimi nakládáno. Mezi národy malými vzkvétají ideály práva a spravedlnosti. — Vaši zásilku tiskovin v různých jazycích o problémech nejmenšího národa, který chce žít a nikoli zemřít, jsem obdržel a děkuji Vám za ni. Mnohé z námětů dobře upotřebím k informační práci o lužickosrbském národě v srdci Evropy. — Přeji Vašemu snažení veškerý úspěch a přijměte mé upřímné pozdravy.“

(Lužickosrbský věstník, březen 1947.)

**Plán a fotografie o rekonstrukci Rotterdamu** s texty v holandštině a esperantu byly vydány městským úřadem a zasílají se zájemcům zdarma. Lze si o ně dopsati na adresu: W. Borsje, Multatulinstraat 29, Rotterdam, Holandsko.

**Jazykové svízele s dorozumíváním** byly i na sjezdu Mezinárodní organizace novinářů, který

skončil v Praze 7. června. Citujeme o tom eufemisticky entrefilet ze Svobodných novin (8. VI.): „Dorozumění bylo mnohdy těžké, již pro jazykové nesnáze. Jistě by bývalo průběhu kongresu přispělo sluchátkové zařízení, jak je zavedli Američané v Norimberku, nebo jak bylo v Praze před Národním soudem. Když Američan sytého basu Murray se letmo zmínil, jak je těžko se porozumět, využil toho pohotově Čechoslovák Láďa Voříšek, který obratem dal rozdat písemné prohlášení, že by tyto těžkosti odpadly, kdyby se všichni naučili esperantu. Většina zahraničních delegátů to chápala jako dobrý vtíp.“

O tom, jak nevyhovuje soustava sluchátková, jsme už dvakrát psali v člancích Američana dra Solzbachera. Bohužel, nejsme čtení tak, jak bychom si zasluhovali a ne těmi, kdož by nás čísti měli. Zdravíme pana Láďu Voříška za jeho pohotovost. Že se to zdálo tolika lidem vtípem, nás nepřekvapuje. Konservativnost je znak lidského chování, novináři v tom nejsou výjimkou.

### Propagační pokyny

(Co může každý udělati pro esperanto)

**Každý dospělý člen vaší rodiny, vaši příbuzní, přátelé a známí, spolupracovníci v zaměstnání, společenové spolky, v nichž působíte, podepíší petici o esperantu k Organizaci spojených národů, dáte-li jim přečísti 1. informační list „Esperanto — jednotné jazykové pojítko národů“ (1 Kčs). Oznamte Svazu esperantistů, kolik „Prohlášení“ potřebujete, dostanete je zdarma.**

**Své cizí dopisovatele upozorňujte ve svých dopisech na esperantské rozhlasové vysílání z Prahy a Ostravy (denně od 17,30 do 17,45 hod. na vlně 31,41 m a od 23,00 do 23,15 na vlně 49,92 m, mimo to v pondělí a ve čtvrtek od 23,00 do 23,15 hod. na vlně 470 m a v úterý od 22,50 do 23,00 hod. na vlně 325 m).**

**Všem významným a vlivným osobnostem ve svém místě zašlete informační list 1.: „Esperanto — jednotné jazykové pojítko národů“. Můžete tak učiniti bez označení nebo s označením své adresy (V účtě zasílá . . . , Věnuje . . . ) nebo s adresou a razítkem klubu.**

**Místní knihkupce a papírníky (hlavně nádražní), případně i trafikanty a prodavače novin, požádejte, aby vyvěsili ve svých výkladních skříních informační list 2.: „Krátké uvedení do esperanta“.**

**Informační listy (1. Pojítka, 2. Uvedení), nalepené na tuhém papíru (kartonu, lepence), vyvěste v místnostech svých schůzí (esperantských i neesperantských), ve veřejných čítárnách, knihovnách, čekárnách, kancelářích a pod. Můžete, ale nemusíte, připojit adresu svou nebo klubu (s razítkem).**

**Obchodníci-esperantisté, vyvěste ve svém obchodě „Pojítka“ s připsanou poznámkou: „Krátké uvedení do esperanta za 1 Kčs — zde v obchodě.“**

**Vždy a všude mějte u sebe informační listy Svazu esperantistů ČSR: 1. Pojítka, 2. Uvedení, neboť vždy a všude, i v době vašeho odpočinku, i v kruzích jinak vám nedostupných, pracují propagačně a informačně za vás. Je to pro každého nejpřístupnější a působivý způsob propagandy — užívejte ho co nejvydatněji! Obětujte každý několik korun na tuto propagandu! Díky vám! (Větší počet listů dodá Svaz se slevou.)**

**Odběratelé „Esperantisty“, kteří neschovávajíte čísla pro vázaný ročník, nikdy čísla nezahazujte a neničte! Vždy je opatřte výzvou „Po přečtení dejte dále!“ a věnujte je známému, aby on je dal zase jinému, nebo věnujte je místní čítárně nebo zašlete je svému zahraničnímu příteli! — Podobně i odloženou učebnici nezahazujte, ale věnujte známému nebo knihovně! Neničte nic, čeho můžete užití jako propagačního materiálu!**

**Ciklo de esper. turismaj paroladoj en Radio-Praha.** De la 7. V. ĝis 18. VI. 1947 parolis Dro A. Pitlik ĉiumerkrede je la 23a h. sur ondo 49.92 pri la jenaj temoj: 1. Turismaj allogaĵoj de ĈSR. 2. Praha antikva kaj moderna. 3. Ĉs. banlokoj. 4. Altaj Tatroj kaj aliaj klimataj lokoj de ĈSR. 5. Subteraj mirindaĵoj de ĈSR. 6. Kasteloj en ĈSR. 7. Naciaj kostumoj kaj folkloro de ĈSR.

**Ne forgesu! Prezento de »Nokto en Karlův Týn« en Doksy estas sabaton la 26-an de julio 1947! Mendojn pri tranoktiĝo akceptas V. Špŭr en Doksy (urba ŝparkaso).**

### SVISA VERKISTO DRO A. BAUR

**faros dum aŭgŭsto (post la kongreso) prelegvojaĝon (kun filmo). — Esperantistaj kluboj, kiuj volas aranĝi lian prelegon, skribu tuj al s-o Ant. S l a n i n a, P r a h a X V I, N á d r a ŝ n í 13, kiu estas komisiita de la Asocia komitato organizi tiun ĉi prelegvojaĝon. — Ĝi estas post la milito unua nia entrepreno tiuspeca. Ĝia valoro propaganda povas esti tre granda. — Tial faru ĉiu sian eblon.**

#### ESPERANTO PAROLATA

Bela emajlita ŝildo, efika propagandilo.  
Mendu sendante 32.— Kčs al  
FR. PATERA, CHEB, Britská 42.  
Liveras ankaŭ EAĈSR

#### Samideano serĉas laboron.

Esperantisto 22-jara, pro malsano devigita forlasi sian tajloran metion, sed laborkapabla, serĉas okupon en Praha kiel oficisto aŭ suboficisto. Volas diligente labori kaj ne postulas altan salajron. Scias bone Esperanton.  
Demandojn respondas EAĈSR.

#### Esperanto korespondata. Esperanto parolata.

Florvendejo de artefaritaj iloroj  
„SVOBODA“,  
Plzeň, Pražská. Telef. 2210.

**Malmultekosta efika rimedo por ĉesi fumadon (aŭ cigaredojn aŭ cigaron aŭ pipojn) estas mendebila ĉe s-ano Svačina Fran, delegito de IEL, en Lanžhot 663, Moravio.**

#### INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO

okazos proksimume je la 15.—22. julio 1947, aranĝita de GEE en Francujo. Ni invitas al partopreno ĉiujn Esperanto-instruistojn, preeipe tiujn, kiuj flue parolas E-on. Paroladoj, diskutoj, debatoj, kantado, deklamado, teatraĵo; pedagogiaj kaj lingvaj demandoj. Plu detale informos vin prof. Jeanne Dedieu,  
3, rue Arzac, Toulouse, Francio.  
Almetu respondkuponon!